

Machado de Assis: **Teatro**, kvar komedioj tradukitaj en Esperanton. Eldono en la 50-a jaro de la morto de la aŭtoro far la Brazila Esperanto-Ligo, Rio de Janeiro, 1958. 160 p., 12,5 × 18,5 cm<sup>2</sup>. Prezo de broŝurita ekz. 10 steloj, de bindita ekz. 18,75 steloj.

Niaj brazilaj amikoj pliriĉigis nian teatran literaturon per 4 amuzaj kaj bone tradukitaj unuaktaj komedioj, kiuj nepre taŭgas por prezentado far amatoroj en niaj grupoj. Lingvajaj makuloj estas nur maloftaj. Kelkaj troviĝas en la antaŭparolo, pri kiu ne estas klare, ĉu ĝi estas verkita rekte en Esperanto far J. Paulo de Medeiros, Prezidanto (nun mortinta) de la Beletristika Akademio de Rio de Janeiro, aŭ ĉu ankaŭ ĝi estas tradukita. Cetere ne povas esti ĝuste ke de Assis naskiĝis en 1839 kaj estis dudek-sepjara en 1862.

En la teatraĵoj mem mi trovis erarojn aŭ dube bonajn esprimojn sur p. 20, 31, 32, 36, 41 (ĉu „*nekontestebla fakto*” aŭ „*kontestebla aserto*”?), 43, 45, 47, 59 (*laŭ estu kiel*, sur linio 4). 62, 63 (3 ×) (fali ne *el*, sed *de* aŭ *de sur* ĉevalo), 75 kaj 84 („*konsultu iun, kiu jam estu estinta malsana*”: la duobla volitivo ŝajnas troa; kial ne simple „*estis*”?), 80 (*estos resaniĝinta post*), 94 kaj 112 (la plej ... a, kiu iam (ne: *jam*)), 95, 97, 104, 105 (*ankaŭ estu ankoraŭ*), 113 (*peto aŭ pelo* de la koro?), 113 (en la mezo de la paĝo okazis ia misaranĝo), 120 kaj 121 ricevi estu akcepti), 121 (*eklogo?*; du kaŭzoj por ke li estu teda?), 123, 137, 138 (*samlimaj?*). Plurfoje troviĝas adverba participo, kie alia esprimo estas necesa aŭ preferinda; unufoje estis male; kelkfoje *ĉu ... ĉu ... devas esti ĉu ... aŭ ....*

— W. P. R.

408.92(05)(438)

„**La Verda Vojo** — monata revuo pri la internacia lingvo kaj ĝia praktika apliko en la literaturo, arto, filozofio kaj kulturo. — Redaktas la *Interlingva Grupo de la Klubo de Juna Intelektularo „La Kurba Rondo*”. — Redaktoroj responsaj: *Tadeusz J. Michalski* kaj *Jerzy Witkiewicz*. Redaktoro grafika: *Juliusz Puchalski*. — Korespondadreso: *Warszawa 40, skrytka 16, Pollando*. Telefono 4-61-22. — La manuskriptoj ne akceptitaj estas laudezire resendataj. **La Redakcio akceptas nur la legeblajn manuskriptojn sen la supersignoj** [grasa tipo pro emfazo nia (S.R.)] — *Represo permesata* kondiĉe ke oni citu la fonton.”

Modernaspekta revuo, kiu estus rekomendinda, se la redakcio ne estus deklarinta la donkihotan militon al la supersignoj — pardonu, al la supersignoj esperantaj! Ĉar la polajn super-, sub-, kaj tra-signojn, kiel ankaŭ la francajn kaj hispanajn, ĝi akceptas senproteste. Se poloj, francoj, germanoj, angloj, nederlandanoj en siaj naciaj lingvoj ofte skribas unu sonon per du aŭ tri literoj (ekz. *sz, ch, sch, sh, sj*) tio estas stultaĵo, sed finfine ilia afero. En Esperanto ni ne imitu tiajn stultaĵojn. Ni konstata ke G. B. Shaw estis pli prudenta ol la redaktoroj de *La Verda Vojo* al kiuj ni — ĝis prudentiĝo — rifuzu ĉiujn helpon kaj subtenon.

— W. P. R.

## ATAKOJ KONTRAŬ GARDENPLANTOJ de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, krome membro de la Akademio de Esperanto

*La unua libro aperinta en Esperanto:*

pri GARDENKULTURO,  
pri INSEKTOJ,

pri PLANTMALSANOJ,  
pri DAMAĜAJ FUNGOJ.

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro

**entute enhavas 160 bildojn!**

Belege tuttote bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, aŭ franko 9p.

Eldonita de  
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO

Mendebla ĉe  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando,  
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en Esperanto:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de “Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” ..... La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia lingvo estas senerara. Ĝuebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Ĉefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Svedujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran faklibron ..... Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.